

SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc - Roussillon »

72, Avenue Général de Gaulle - 66000 PERPIGNAN ☎ 34.22.18

JARA ABONO : 10 F

C.C.P. 956-28 Montpellier

1-a Kvaronjaro 1980

N° 75

FEDERACIA KONGRESO en BEZIERS 13-an de aprilo

La jara kongreso de la Kataluna kaj Okcitan Federacio okazos la dimanĉon 13-an de Aprilo 1980 en BEZIERS, je la 9-a, en CASERNE St JACQUES, Avenue de la Marine (enirejo Place des Casernes), apud la Stacidomo. Ni tagmanĝos ĉe Restoracio "L' OCCITANIE", 43, Allée Paul Riquet. Prezo : 30 F.

Bonvolu anonci vin antaŭ la 5-a de aprilo por informi la restoraciestro pri la nombro de gastoj.

Tiuj kiuj deziras tranĉti Sabaton en Béziers ankaŭ devas sciigi tion la plej frue kiel eble.

SKRIBU al CERCLE BITERROIS d'ESPERANTO (aŭ S-ino AUTHIER), 9, Rue Georges Picot, 34 500 BEZIERS (Tel. (67) 28.54.27)

La Prezidanto, René LLECH-WALTER

VIVO DE LA GRUPOJ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

MONTPELLIER : LA KLUBO FUNEBRAS....

Fraŭlino Antoinette HORTOLAN, nia amata prezidantino, preskaŭ subite mortis dum la nokto de la 18-a de septembro, en SETE, dum la esperanta semajno. Dum Junio, ni festis ŝiajn 80 jarojn.

Agema sur ĉiuj kampoj, ĉefe en sindikataj medioj, ŝi delonge interesiĝis al Esperanto, kiun ŝi lernis en 1935.

Mi konatiĝis kun ŝi antaŭ pli ol 20 jaroj, kiam ni, gejunuloj, planis krei esperantistan klubon en Montpellier; ŝi tuj helpis nin. Mi bezonis "plenkreska" prezidanton, kaj malgraŭ sia modesteco, ŝi akceptis tiun postenon ĉar, ŝi diris : "Mi helpas gejunulojn, kiuj deziras labori". Poste, ĉiam ŝi afable kunlaboris, eĉ kiam ni "netradicie" agadis.

Bonkora, sindonema, gaja, bonhumora, ŝi estis amata kaj ŝatata de ĉiuj.

Ŝi havas gravan lokon en niaj korok kaj memoroj .

Lucette VIERNE

" K I E L D I R I " ?

Tiu verko de nia amiko LENTAIGNE, formato 21,5 x 15, 140 stenciligitaĵoj, enhavas ĉirkaŭ 5.000 esprimojn pritraktanta 67 temojn. Ĝia celo : krei ĉe la uzantoj la bezonon uzi tute pretajn esprimojn por atingi fluan parolkapablon laŭ vere zamenhafa stilo. - La principo : asociado de la ideoj (ĉiufoje kiam eblis...).

Tiun verkon - kiu ne estas vortaro - vi povas mendi kontraŭ 10 F al la aŭtoro, 3, Av. de la Gaillarde, MONTPELLIER (ni aperigos specimenan folion pri "EDZ(IN)O - N° 17, viaj rimarkoj estant petataj de K-do Lentaigne).

B E Z I E R S : INAUGURO de nova STRATO ZAMENHOF (26^{an} de Januaro 1980)

Post longa atendo, ni povis inaŭguri la straton Zamenhof. Ĝi situas en nova kvartalo, apud la RN 113 al Montpellier, vid'alvide al la granda magazeno Casino. Ĉeŝtis multaj esperantistoj kaj simpatiantoj el Perpignan, Narbonne, Montpellier, Nîmes kaj, kompreneble, el Béziers.

Paroladis S-ro Llech-Walter, Prezidanto de Esperanta Langvedoka-Rusiljona Federacio kaj S-ro Balmigère, deputito-urbestro de la urbo. - La ĉeestantoj entuziasmege aplaudis kiam la urbestro malkaŝis la platon sur kiu oni povis legi : " Rue Lazare-Louis ZAMENHOF".

La grupo de Béziers profitis la okazon de tiu inaŭguro por organizi ekspozicion pri "Le Livre Esperanto" en la urba teatro, do en la urbacentro.

Poste, la komitatanoj kaj estraranoj kunvenis en apuda salono por decidi pri la dato kaj loko de la ĉi-jara federacia kongreso kiu ne povis okazi en la antaŭvidita urbo. La decido estis la jena : tiu kongreso okazos je la 13-a de aprilo en Béziers.

Louis ENSUQUE

M O N T P E L L I E R : AL IZOLULOJ...

Tio koncernas la izoluloj loĝantaĵen la departemento Hérault.

Ili estas petataj sendi sian departementan kotizon (10 F -) al :

Fédération Départementale Esperanto

Tiu kotizo entenas CEE aŭ Monopole de la Sudfranco "La membroj de la grupoj de Béziers et Montpellier ne sendu monon. Ilia grupokotizo enhavas tiun abonprezon .

P E R P I G N A N : 3 PRELEGOJ dum 2 MONATOJ...

La Esperantista Kultura Centro en Perpignan, 66000 (Francio), 72, Avenue du Général de Gaulle, organizis tri publikajn prelegojn dum Novembro kaj Decembro.

La unuan faris S-ro Van Heugten, Nederlandano, en Palaco de la Kongresoj, pri Nederlando, per belaj diapozitivoj; S-ro Boumal, Belgo, tradukis france.

La duan faris la juna japano Hiraŭ Jukio, pri la esperantista movado en Japanio kaj Sudkoreo, ĉe la Kataluna Kultura Centro. Tradukis france kaj katalune S-ro Llech-Walter.

La trian faris advokato Abecassis, la 15-an de Decembro, pri Doktoro Zamenhof, ĉe la sidejo de la Centro.

R. L-W.

NOVA ESPERANTO KLUBO en la departemento PYRENEES-ATLANTIQUES :

S-ro Robert Lloancy, lernanto de Llech-Walter en Liceo de Perpignan dum 1961, nun Profesoro en la Kolegio de Bizanos (64320) fondis en tiu urbeto -apud Pau- Esperanto-Klubon.

Deko da junuloj jam aliĝis kaj partoprenis la Zamenhofan feston la 15-an de Decembro. Nova adreso de gesinjoroj Lloancy , 5 Rue Léonard Constant, 64000 PAU (Francio)

R. L-W.

K U R S O J por U N I V E R S I T A T O de la T R I A A Ĝ O

Jam de antaŭ 3 jaroj komenciĝis Esperanto-Kurso en la Universitato de la Tria Aĝo en Montpellier. Nun, 3 kursoj funkcias. Ĉiu elili konsistas el unu horo semajne. La unuan kurson sekvas 7 gestudentoj; la duan : 8 , kiuj firmigas la gramatikaj reguloj de la lingvo. Le progresantoj de la tria kurso, meznombro 12 estas gestudentoj de la unua horo kaj kelkaj aliaj kiuj jam lernis la internacian lingvon antaŭe kaj kiuj deziras perforti en la praktikado.....

.....Ne forgesu ke emerituloj ofte emas vojaĝi eksterlande kaj interparoli kun aliaj triaĝuloj - se Francioj kaj alilanduloj havas, kompreneble, veran helpan lingvon kiel Esperanto... Bedaŭrinde, tio estas tre malofta.

PRELEGO de S-ro DUC GONINAZ en NIMES

Dank'al la kunlaboro de S-ro LESAGE, Licea Profesoro pri angla lingvo kaj Sekretario de la asocio "Maison de l'Europe" kaj de S-ino VOLPELIERE, anino de tiu asocio, preleg-debato pri "Iu lingvo por Eŭropo, ĉu la angla, ĉu esperanto?" povis okazi la 29-an de novembro 1979, sub la aŭspicioj de Maison de l'Europe kaj de la Kultura Esperantista Rondo.

Krom la anoj de tiuj du grupoj, multaj instruistoj pri lingvoj estis invititaj. Sed pro diversaj bedaŭrindaj kaŭzoj, entute la aŭskultantoj ne estis multaj.

S-ro DUC GONINAZ, Profesoro pri rusa lingvo kaj pri esperanto en la Fakultato de AIX en Provence estis afable konsentinta, je nia peto, enkonduki la debaton.

S-ro LESAGE prezentis la preleganton kaj klarigis la de li elektitan titolon. Unue oni devas difini pri kia Eŭropo temas. Ĉu oni elektos nacian lingvon (tiuokaze, la angla ŝajnas en plej bona vico), ĉu neŭtralan lingvon kiel esperanton?

La oratoro disvolvis tiujn diversajn temojn.

Li rimarkigis, ke Eŭropo, pli ol kiu ajn mondregiono prezentas duoblan karakteron, kiu necesigas komunan lingvon. Iuflanke, li diris, ekzistas multaj lingvoj en mallarĝa spaco? Laŭ la eŭropaj limoj, kiujn oni konsideras, estas de 25 ĝis 65 lingvoj. Aliflanke la ekonomiaj, turismaj kaj kulturaj interŝanĝoj fariĝas pli kaj pli intensaj en ĉi regiono. Fine la eŭropaj popoloj posedas kulturojn diversajn, sed iamezure oni povas konsideri, ke ekzistas komuna eŭropa kulturo.

Se kelkaj landoj: Svisio, Jugoslavio, Sovetio ŝajnas kontentiĝi pri plurlingvismo kaj se teorie ĉiuj lingvoj en tiuj ŝtatoj havas egalan statuton, praktike unu superregas la aliajn. Ni notu, ekzemple, la hegemonion de la rusa super la 130 lingvoj parolataj en Sovetio.

Male ni notu, ke en Belgio la lingva konflikto ne estas solvita.

Tiu situacio prezentas gravajn malavantaĝojn.

Kvankam la angla lingvo efektive superas la aliajn en la mondo, en Eŭropo okcidenta, la franca kaj la germana havas sian gravecon, tiel kiel la rusa en orienta Eŭropo.

Konsekvencaj iaflanke vera batalado, aliflanke "skandala malŝparo", kiu koncernas nin ĉiujn kiel impostpagantojn.

La nun adoptitaj rimedoj estas por Eŭropaj Institucioj: tradukado kaj samtempa interpretado, rimedoj ege multekostaj kiuj plipezigas kaj plimalrapidigas la laboradon, kreas malŝparon de papero kaj de energio.

Alia rimedo estas la studado de fremdaj lingvoj. Sed ĉi tie oni sin turnas nur al inteligenta elito, ĉar lerni plurajn lingvojn estas ege malfacile. Krome du interpreto-lantoj povas koni plurajn lingvojn, sed ne la samajn.

Por la internaciaj Asocioj ne oficialaj neniu rimedo ekzistas, ĉar ili ne disponas pri sufiĉaj financaj ricevoj... Same kiel por ĉiuj homoj, kun ordinara inteligenteco, kiuj rajtas ankaŭ, ĉu ne? al rekta komunikado.

La internacia uzado de nacia lingvo havas nur provizoran daŭron, tion pruvas historio. Antaŭ kelkaj jarcentoj, internacie oni parolis la latinan; dum la 17-a jarcento, la francan, poste la britan kaj nun la usonan. Tio, sekve de la pli granda influo ekonomia, politika kaj scienca de la popoloj, kiuj ilin parolis kaj parolas.

Ĉu la ne-angloparolantaj popoloj konsentos, ke oni trudas al ili la anglan lingvon, tre malfacilan koncerne la prononco? Pro tiu malfacileco de prononco multaj britoj mem opinias, ke tio estas ne dezirinda.

Dum persistadas la multeglingveco, t.e. la ne komunikado, la problemo estas, de jardekoj, solvita por la komunumo, kiu uzas esperanton, lingvon kiun oni diras artefarita, kio estas ne-ekzakta, ĉar la aŭtoro ĉerpis la preskaŭan tuton de la radikoj el la vort-trezoro "india-eŭropa" kaj la restaĵon el aliaj vivantaj lingvoj. La esperantista komunumo estis kaj estas daŭre sufiĉe multnombra por pluvivigi kaj progresigi sian lingvon ĝis la nuna stadio.

La problemo estas do ne lingva, sed politika kaj socia. Ĝi estas la problemo de la disvastigo de esperanto.

Jen resume tio, kion diris M. DUC GONINAZ.

La debato daŭris preskaŭ du horojn dank'al la intervenoj de kelkaj prilingvaj instruistoj, kiuj levigis demandojn, jen ĝeneralajn, jen teknikajn.

...../.....

ALLOCUTION de M. René LLECH -- WALTER , Président Fédéral
à l' INAUGURATION de la Rue du DOCTEUR Z A M E N H O F
à B E Z I E R S , le 26 JANVIER 1980

Mesdames, Mesdemoiselles, Messieurs .

Je salue respectueusement M. BALMIGERES, Député-Maire de BEZIERS et M. BAYOU, Député de l'Hérault, qui vient de me confier qu'il avait appris l'Esperanto à Aspremont avec M. Yelland.

Est-ce parce que je suis Président de la Fédération d'Esperanto "Languedoc-Roussillon", ou parce que je viens de Perpignan, ville où, il y a 44 ans - oui, en 1936, le Conseil Municipal catalan décidait, sur ma proposition, de donner le nom du Dr Zamenhof à une grande artère de Perpignan --, que l'on m'a choisi pour prononcer le discours inaugural ? Peut-être pour ces deux motifs et c'est avec plaisir que je viens à Béziers où il y a toujours eu de fervents esperantistes.

L'année dernière, c'était Montpellier qui nous donnait la joie d'inaugurer une Rue du Dr Zamenhof, et, lors de la cérémonie, j'avais mis en avant le rôle de grand humaniste qu'avait joué le Docteur Zamenhof en donnant au monde une langue simple et logique pour briser les frontières linguistiques.

A Béziers je voudrais démontrer que l'Esperanto n'est pas un projet, mais une réalité. Trop de personnes sont peu ou mal informées et pensent que l'Esperanto n'est plus parlé, que c'est une langue morte.

Bien au contraire l'outil d'intercompréhension que nous a légué le Docteur Zamenhof est bien vivant : 64 Congrès internationaux réunissant des milliers d'esperantistes de plus de 50 pays se sont déroulés dans les grandes villes du monde entier.

Le 1er Congrès Universel a eu lieu en 1905 à Boulogne sur Mer, en présence du Dr Zamenhof; dans ce port français, on a assisté à cette chose merveilleuse et miraculeuse : des centaines d'hommes venus des quatre coins du monde se comprenant et fraternisant avec un enthousiasme indescriptible.

En 1954, l'U.N.E.S.C.O. reconnaît le fait esperanto, confirmant le vœu émis en 1924 par l'Académie des Sciences de Paris déclarant que cette langue était un chef-d'oeuvre de logique et de simplicité. Au Congrès Universel en Islande (1977), le Directeur Général de l'Unesco vient en personne apporter le salut de son organisme et assurer les esperantistes de son soutien.

Ce que le grand public ne sait pas ou feint d'ignorer c'est que, dès l'étude de l'Esperanto terminée, on peut immédiatement utiliser cette langue, soit pour la correspondance internationale, soit pour les voyages à l'étranger, grâce au réseau de délégués consuls dans le monde entier.

En plus du charme de la correspondance et de la conversation, il y a la "interna ideo", l'idée interne, qui donne à tout esperantiste le sentiment d'être un homme en face d'un autre homme, avec les mêmes droits, les mêmes devoirs, sans supériorité de l'un sur l'autre, car on emploie un langage neutre et, dans cette atmosphère de compréhension, sur un pied d'égalité, se crée un climat fraternel, générateur de paix.

Je me souviens avec émotion du Congrès Universel de Zagreb, en Yougoslavie, où l'Unesco avait envoyé un observateur, M. Lebard; à la fin du Congrès, ce représentant de l'Unesco m'a avoué qu'il avait été surpris de voir avec quelle facilité les congressistes de nationalité différente se comprenaient et il a même ajouté : " Si les gouvernements de tous les pays pouvaient assister à un de vos congrès universels, ils seraient convaincus, comme je le suis moi-même, de l'utilité pratique de l'Esperanto".

Aussi, est-ce avec reconnaissance que je m'adresse au représentant de la Municipalité de BEZIERS, car nous sommes toujours très sensibles aux aides qu'apportent les Pouvoirs Publics à notre cause fraternelle et pacifique. Paul RIQUET a relié la Méditerranée à l'Atlantique : puissent un jour les esperantistes, toujours plus nombreux, relier Béziers au Monde entier en véritables citoyens du monde .


...../.....

K R U C V O R T O J

Horizontale



- 1 - Singeneco ne plenigos lian sakon
- 2 - Li havas grandan imagpovon - Kiu venas el ĝi iras al ĝi
- 3 - Malŝatata ronĝulo (R) - Ĝi ofte subtenas studenton (R)
- 4 - Procesio - Ĝi protektas la eĝon de stofa (R)
- 5 - Flanko de ŝipo submetata al la vento (R) - vojo
- 6 - Li ŝatas freŝan karno - Simila al silento (R)
- 7 - Infekta malsano - Sufikso
- 8 - Ĝi ne defendas kontraŭ doloro (R) (R)
Ĝi estas tiel kutima al francoj kiel humoro al angloj
- 9 - En la komenco de tago - Provizisto
- 10 - Ŝirmilo (R) - Malvigla (R) - En karno
- 11 - Franca urbo (R) - En vino
Inverse: ŝatfiguro
- 12 - Verba finaĵo - Numerala adverbo
En la spino



R. Raynaud (1980)

Vertikale



- 1 - Trompa aĉero (du vortoj)
- 2 - Franca rivero - klara kaj penetra (R)
- 3 - Vortfiguro - Denove
- 4 - En osto - ornama kunpletaĵo el floroj kaj folioj en formo de festono (R)
- 5 - Maraj herboj kiun oni uzas sekigitaj kiel sterkon - Inverse vikaj mi
- 6 - Duono de tago - La matura estas nigra (R) - Negacio
- 7 - Komence direkti sin al iu celo - Oto
- 8 - Hakilo - Tia ŝlosilo malfermas ĉiujn pordojn
- 9 - Parto de tersurfaco (R) - Insekmanĝuloj kies haŭlo estas kovrita de pikiloj
- 10 - Parto de la diservo, kanonika horo, kiu en la Mezepoko okazis ĉirkaŭ la 15-a
El ĝiaj semoj oni ricevas oleon (R) - En la mezo de kareso
- 11 - substanco uzata en kemio kaj farmacio (R) - Ilo de mazonisto
- 12 - Virina nomo (R) - Futuro.

* - (R) nur radiko

* - Solvo de la antaŭa problemo

S	M	I	R	G	A	P	A	P	E	R	O
P	O	L	U	R	I	■	M	E	M	O	R
I	N	■	S	I	N	O	P	T	I	K	O
K	U	L	T	O	■	P	L	■	N	E	T
U	M	E	O	■	S	T	E	L	E	T	O
M	E	V	■	E	T	I	K	■	N	■	R
I	N	■	B	R	E	M	S	■	T	I	O
■	T	E	■	P	R	I	■	N	U	N	■
S	O	■	M	I	K	S	I	■	L	I	A
P	■	B	A	L	O	T	A	S	■	C	I
I	R	I	S	■	■	O	M	A	G	I	S
L	I	S	T	E	L	■	A	N	U	S	■

Solvo
de la krucvortoj
aperinta sur la N° 73

5 minutoj de paŭzo



Vere, oni diras ke mi havas multe da fantazio



Mi ne bedaŭras la veturilon grava afero, estas ke mi ĵus plenigis la rezervujon.



Matematika ekzemplo por geedzoj

Ĉu vi havas alumeton?

Jen ekzemplo pri nia lingvo uzata en neesperantista medio.
Diversstema serio de 8 kartoj kiuj estas mendeblaj francalingve
al eldonisto : Pierre JEUDY 8, Square Carpeaux 75018 PARIS

LE NUCLEAIRE EST L'ERREUR

DERNIERE DES HOMMES

ELSAŬIĤH : De krabs radio-aktiv : Langsanmer oder schnaller tod.

DEUTSCH : Der radio-aktive Krebs : langsamer oder schneller Tod.

NEDERLANDS : Radio-actieve kanker : langzame of accute dood.

BREZHONEG : Ar ch' rign-bew skinoberius : Marw hir pe brim.

VLAAMS : Radio-actieve Kanker : Trage of brutale dood.

ESPERANTO : La kancero radioaktiva : morto malrapida aŭ brutala.

FRANĈAIS : Le cancer radioactif : mort lente ou brutale.

ENGLISH : Radioactive cancer : Slow or brutal death.

CATALÀ : El càncer radioactiu : mort lenta o brutal.

ESPAÑOL : El cancer radioactivo : muerte lenta o súbita.

ESKUARA : Kanzer radioactif deitua : Hiltzea emeki edo supituki.

OCCITAN : Lo càncer radioactiu : Morir lentament o sul còp.

CORSU : U cancaru radioattivu : Morte attempata o malamorte.

ITALIANO : Il cancro radioattivo : morte lenta o brutale.

R. F. M. S.

Et je voudrais terminer mon allocution sur des paroles de ZAMENHOF que j'emprunte à son hymne, d'abord en français, puis en esperanto :

Dans le monde a surgi un sentiment nouveau,
A travers le monde passe un puissant appel ;
Sur les ailes d'un vent propice
Qu'il vole maintenant de lieu en lieu !
Ce n'est pas au glaive assoiffé de sang
Qu'il attire la famille humaine :
Au monde éternellement en guerre
Il promet une sainte harmonie.

Tra la mondo venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko ;
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.
Ne al glavo sangon soifanta
Ĝi la homan tiras familion. ;
Al la mond'eterne militanta
Ĝi promesas sanktan harmonion .

ESPERANTO
Langue Internationale



Congrès Régional
Languedoc-Roussillon

IMP. GÉNÉRALE - NIMES

DANKON....MERCI!/....

R. L-W.

Esperantista Marsemajno

De la 21-a ĝis la 28-a de septembro 1980 ni organizas esperantistan semajnon en Lazaret. Lazaret estas tre agrabila kaj komforta feriejo en parko, ĉe la mediteranea maro. Tie oni povos sin bani, studi, babili, promeni, ludi....laŭplaĉe.

- Matene divers-nivelaj kursoj estos proponataj al laboremuloj ;
- Posttagmeze, ekskursoj, vizitoj,.....
- Vespere ludoj, kantoj, prelegoj. ..

PREZO : loĝado kaj 3 manĝoj :
en unupersona ĉambro : 680 F) Favana prezo por aliĝo
en dupersona ĉambro : 540 F (antaŭ la 15-a de majo.
730 F kaj 570 F ĝis la 1-a de Julio.

- Ni rezervis nur 40 lokojn.
Aliĝo valoras nur kun garantia sumo de 50 F.

ADRESO : Centre Culturel Esperanto , 5 Rue Docteur-Roux , 34000 MONTPELLIER
C.C.P. Montpellier 1.487 - 48

PRELEGO de M. DUC GONINAZ en NIMES (Daŭrigo paĝo 3^a k. fino)

Tiu debato ebligis Duc Goninaz precizigi multajn punktojn kaj pli profunde informi la aŭskultantojn, pri temo, kiun oni plejofte rigardas supraĵe.

Lasta demando faris S-ro Lesage : " Oni parolis pri ideologioj prezentataj de naciaj lingvoj, sed ĉu esperanto estas vere neŭtrala kaj senkulpa ?"

Respondo : " Lingve, memvideble, ne estas ideologio. Sed fakte esperanto kontraŭas ĉian imperiismon, ĉian ŝovinismon, ĉian rasismon."

GE - VOLPELIERRE

MONDISTA VERKO en ESPERANTO

Multaj Langvedok-Rūsiljonanoj posedas sian identec-karton de Mondcivitano en esperanto kaj sendube estos feliĉa ekscii, ke la unua mondisto libro en la okcidentaj landoj estas tradukita de la franca lingvo en esperanton.

Temas pri la verko de Guy Marchand : "UNU aŭ NUL" (Unuiginta Mondo aŭ Nenio), tradukita de G. Lhéritier kaj korektita de R. Laval.

R.&R. Volpeliere

Laù Kokina anuso

Jen kio okazis al mia Aleksandro... amiko

Antaù unu monato li invitis matenmanĝi venontan dimanĉon sian plej karan amikon Ludoviko-n .

Li intencis manĝigi lin tre belan brian kokinon, zorge rostitan de li mem sur lia elektra rostostango.

La antaŭan tagon de tiu festenmanĝo, li vizitis la magazenenon de la plej fama kortthirdvendisto de la urbo, kaj lin petis vendi al li tre belan brian kokinon.

La komercisto iris al la fundo de sia magazeno kaj alportis kokinon, kiun li tuj surmetis sur pesilteleron.

- Ĉu vi certas, ke tiu kokina estas Bria ? demandis lin Aleksandro ;

- Absolute, respondis la vendisto ..

- Atendu iometon, rebatis Aleksandro. Mi konas nepran rimedon por tion tut-certe ekscii.

Li alprenis la kokinon, enmetis sian dekstran montrorofingron en ĝian anuson, ĝin elmetis kaj flaris.

- Mi bedaŭras, diris li. Ne, via kokino ne estas Bria, sed Perigorda. Elektu zorge alian.

La vendisto longatempe serĉis en sia fridujo, kaj revenis kun nova kortobirdo, kiun Aleksandro esploris samkiel la antaŭan.

Sed ankoraŭfoje, laù la odoro de lia fingro, tiu birdo ne estis Bria, sed ĉi-foje Korsika.

Kaj triafoje okazis same. Tiun trian fojon la kokino estis Vaska.

Sed la komercisto ege furiozigis la farmaniero de Aleksandro. Li eĉ tiagrade furioziĝis, ke li subite faligis sian pantalonon, suprenlevis sian ĉemizon, kaj turnante la pugon al Aleksandro, kriis al li :

- Nu, kara Sinjoro mi mem ne scias kiu regiono mi naskis. Mi ja estas infano de Publika Asistado, bonvolu diri al mi pere de via fingro en kiu provinco mi estis generita.

Esperantigis G O S O



Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES

Dépot Légal : 1^{er} Trimestre 1980

Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes